

## NOTOJ ĈE »MISKONCEPTOJ ĈE LA KAZOJ DE SUBSTANTIVO«

La lasta artikolo de s-ro Blázquez ŝajnas havi bazon ne pli solidan ol mezlerneja kono de kelkaj fremdaj lingvoj kaj ignoras tute la modernan strukturan lingvistikon, ekz. »Language« de Bloomfield, »Morphology« de Nida kaj »Aspects of theory of syntax« de Chomsky. Pri la distingo inter fleksio kaj derivado li legu prefere »Morphology« de Nida, p. 99. Ne nur Nida, sed ankaŭ aliaj kompetentaj aŭtoroj insistas, ke la diferenco inter fleksio kaj derivado estas **morfologia** (la loko de la koncernaj morfemoj en vortfomo, la ebleco de aldono de pluj morfemoj, k. t. p.) aŭ **sintaksa** (la ebleco de substituo de unu vortformo por alia konservanta la gramatikan korektecon de la frazo). Derivado kreas vortformojn kun la sama ekstera distribuo kiel unumorfemaj vortoj de la sama formklaso. Ekz. **winterlich** en lia ekzemplo sintakse kondutas tute kiel adjektivo kaj estas (kun konservo de la gramatika korekteco, ne necese kun konservo de la signifo) anstataŭigebla per adjektivo unumorfema: **winterliche Kälte** — **schroffe Kälte**.

Sed Blázquez, kvankam parolante pri la sintaksa funkcio, atentis praktike nur la **signifon** de la vortformoj. Tial el la fakto, ke **winterliche Kälte** kaj **Kälte des Winters** signifas proksimume la saman, li konkludas, ke **Winters**, kiel **winterlich**, estas derivita adjektivo. Sed tiel **morfologie** (al **winterlich** estas aldoneblaj fleksiaj finaĵoj, al **Winters** neniu ligita morfemo estas aldonebla) kiel **sintakse** (**Winters** kaj **winterlich** ne estas interŝanĝeblaj kun konservo de la gramatika korekteco: **winterlich** staras antaŭ la substantivo kiun ĝi determinas, **des Winters** malantaŭ) **Winters** kaj **winterlich** kondutas tute malsame. Tial lia konkludo estas falsa.

Analoge por la ablativo.

Verl. v. Themaat